SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio | El Vol.28 n-ro 1/2(123/4) 25.04.1977.

# ŜANĜO DE BALKONOJ DUM LA DOMREKONSTRUADO EN URBO ĤARJKOV

(D.M. Cibulevskij, Ĥarjkov, Sovetio)+/

La loĝeja fonduso en USSR estas financa grandvaloraĵo, kies konservado iĝis grava ŝtata tasko. La solvo de tiu tasko devas esti garantiata per senerara teknika ekspluatado, ĝustatempa riparado kaj rekonstruado de la ekzistantaj domoj.

La rekonstruado de domoj estas neeviteble ligita kun reorganizo de la loĝeja fonduso pere de la kompleksa rekonstruo de la ekzistantaj domoj, ilia plikomfortigo, rekonstruo kaj kolorigo de la domfasadoj ktp.

Analizo de la nuntempa praktiko en la landa kaj eksterlanda urbokonstruadoj (1) permesas konkludi, ke la riparado kaj rekonstruado de loĝdomoj estas leĝkonforma neceso.

Ne malofte estas bezonata superkonstruado de domoj, plena aŭ parta ŝanĝo de diversaj konstruaĵoj.


Apartan atenton dum la domkonstruado okupas ŝanĝo de malnovaj monolitaj neutiligeblaj balkonoj je la novaj muntataj ferbetonaj.

En la urbo Ĥarjkov por tiu celo oni uzas balkonojn, kiuj estis projektitaj en la Ĥarjkova filio de la instituto "Ukrĵilremprojekt" (Ukrainia instituto pri projektado de domrekonstruo) (vidu la desegnaĵon 1).

+/ Ĉajkovskogo 25-11, ĤARJKOV-24,310024, USSR.

Des.1

Novmuntita balkono el ferbetonaj elementoj



Konsiderante la diversecon de dimensioj kaj formoj de la ekzistantaj balkonoj, la instituto ellaboris diversseriajn industriajn balkontipojn (2), nome: 1) BK 08-16 (1,6:0,8) (la ciferoj en parentezoj montras, respektive, la longon kaj larĝon de la balkono);2) BK 08-20 (2,0:0,8);3) BK 08-24 (2,4:0,8);4) BK 08-28 (2,8:0,8);5) BK 08-32 (3,2:0,8);6) BK 10-16 (1,6:1,0);7) BK 10-20 (2,0:1,0); 8) BK 10-24 (2,4:1,0); 9) BK 10-28 (2,8:1,0); 10) BK 10-32 (3,2:1,0); 11) BK 12-16 (1,6:1,2); 12) BK 12-20 (2,0:1,2); 13) BK 12-24 (2,4:1,2); 14) BK 12-28 (2,8:1,2); 15) BK 12-32 (3,2:1,2).

La balkonŝanĝon oni faras laŭ la jena sinsekvo:

1. Malkonstruo de neutiligeblaj balkonoj,
2. Truigo de la brikmuro por balkonelementoj,
3. Muntado de la balkonelementoj,
4. Ŝtopado de la murtruoj,
5. Konstruo de hidroizoligo kaj balkona ebentavolo.

Post la balkonŝanĝo oni komencas ripari la domfasadon, paralele kun tio oni koloriĝas la balkonajn kradojn kaj parapetojn.

Rekonstruaj trustoj en Ĥarjkov jam tri jarojn praktikas la balkonŝanĝojn je la novaj tipoj. La praktiko montras ilian taŭgecon por la ekspluatado kaj plibeligo de la domfasadoj.

La Ĥarkovaj projektantoj siavice serĉas novajn vojojn por plibonigo de la balkonkonstruoj.

Resumo

ŜANĜO DE BALKONOJ DUM LA DOMKONSTRUADO EN URBO ĤARJKOV

D.M. Cibulevskij, Ĥarjkov, Sovetio

Estas karakterizataj la novaj muntataj ferbetonaj balkonoj, ellaboritaj en la Ĥarjkova filio de la instituto "Ukrĵilremprojekt" kaj uzataj dum la rekonstruado de domfasadoj en la urbo Ĥarjkov kaj en la regiono.

L I T E R A T U R O

I.Колотилкин Б.М.,Долговечность жилых зданий, Москва,I965.

2.Конструкции и детали повторного применения при капитальном ремонте зданий. Серия ИКР I.I37-3
Сборные железобетонные балконы.Киев,I974 :
а/Выпуск I "Материалы для проектирования и монтажа"
б/Выпуск 2 "Консоли, обвязочные балки, плиты"
в/Выпуск 3 "Металлические ограждения".

3.Каталог изделий для капитального ремонта и реконструкции зданий. Серия ИКР-ОI.02.Выпуск I."Железобетонные изделия".Киев,I972.

4.Рыженко Ф.И. "Ремонт жилых зданий", Ростов-на-Дону,I964.

Резюме

СМЕНА БАЛКОНОВ ПРИ РЕМОНТЕ ЗДАНИЙ В ГОРОДЕ ХАРЬКОВЕ

(Цыбулевский Д.М. - Харьков,СССР.)

В работе характеризуются сборные железобетонные балконы , конструкция которых разработана в Харьковском филиале института "Укржилремпроект" и применяемые при ремонте фасадов зданий в городе Харькове и области.